

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Vol 51, No 1 — 2012:1 (jan–feb)

Redaktisto • *Editor*: HOSS FIROOZNIJA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to*:

✉ bulteno@esperanto-usa.org

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto (American Esperantist) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content two months after publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to an address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.



Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vivaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn du monatojn post la eldondato, kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de republikigita materialo al supra adreso. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktisto aŭ de Esperanto-USA.



Centra Oficejo • Central Office

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

Direktoro • Direktoro, CO: William B. HARRIS

Prezidanto • President: Orlando E. RAOLA

Vicprezidanto • Vice President: Philip G. DORCAS

Ksekretario • Secretary: Steve BREWER

Kasisto • Treasurer: George BAKER

Aliaj estraranoj • Other board members: George BAKER, Neil BLONSTEIN, Steven CYBULSKI, D. Gary GRADY, Tor KINLOK, Julie SPICKLER, Ĝan STARLING, Julie WINBERG, Christine WINGROVE.

Korektoj

- In issue 2011:6 the *preskoboldoj* stole a “y” from both the name and email address of Yevgeniya Amis, author of the article *A Language of Choice*. Yevgeniya’s correct address is <yevgeniya_amis@yahoo.com>.
- Inter la solvintoj de la pasint-numera enigmo ni neglektis listigi la nomon de leganto Olga DU TEMPLE, kies tre bele kaj elegante manskribita letero momente perdiĝis en ĥaosa papersvarmo ĉe la redakcio. Kiel kutime, Olga solvis la enigmon perfekte!

Mi pardonpetas pro la eraroj. —Red.

Nova kasisto

Estimataj geamikoj:

La pasintan 5-an de Januaro, mi ricevis mesaĝon de Chris ZERVIC pri demisio el sia posteno kiel Kasisto de Esperanto-USA. Mi akceptis lian rezignon.

Laŭ la dua paragrafo de artikolo 502 en nia Statuto, mi iniciatis konsulton kun la Estraro, kaj sukcesis atingi subtenon por la nomumo de estrarano George BAKER kiel la nova Kasisto de la Asocio. La nomumo fariĝis efektiva ekde la 8-a de Januaro. Temas pri portempa nomumo ĝis Junio, kiam ni scios la rezultojn de ĉi-jara elekto de asocia Kasisto.

— Orlando E. RAOLA

Prezidanto, Esperanto-USA

We need you! Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly magazine *Usona Esperantisto*, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone: _____ E-mail: _____

Birthdate (MM/DD/YY): ____/____/____

In the member list, don't publish my: postal address phone email address

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

- Friend of Esperanto \$10.00
(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)
- Youth *(you must be under 27)* \$20.00
- Limited Income \$20.00
- Individual \$40.00
- Family \$60.00
- Sustaining \$80.00
- Life *(birthdate required)* \$800.00

I would like to receive the magazine, *Usona Esperantisto*, in:

Paper form only Electronic (PDF) form only *(email address required)* Both

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

Card verification #: _____ *(three digits on back of card, or on front for AmEx)*

Upcoming events

For a comprehensive list of upcoming events worldwide, see <<http://www.eventoj.hu>>.

May 19 – 21 (Québec City)

Mid-Canada Gathering (MEKARO)

The *Mez-Kanada Renkontiĝo* occurs each May in a different Canadian city. MEKARO is a weekend of tourism via Esperanto; it provides opportunities to learn about the host city, sample local delicacies, and make friends with other Esperanto speakers. For more information, contact <informo@esperanto.qc.ca>.

June 22 – 25 (Dallas, Texas)

Landa Kongreso de Esperanto-USA

This year the National Convention of Esperanto-USA comes to the University of Texas at Dallas (UTD). In addition to official business, the program includes a variety of talks, informal get-togethers, games, excursions, and a banquet. Sign up at <<http://esperanto-usa.org/retbutiko>> (click on “National Congress” on the left side of the page). Come join us and help celebrate Esperanto’s 125th anniversary! Then, stay for...



Estonten!

June 25 – July 4 (Dallas)

NASK: La Nord-Amerika Somera Kursaro

This year the North American Summer Esperanto Institute (NASK) follows the *Landa Kongreso*—not only in the same city, but in the same building—so you can participate in both events with just one trip. Like last year, NASK now includes eight days of study; those arriving early for the *Landa Kongreso* will have 12 consecutive days in *Esperantujo*! For details on instructors, the program, and cost, see page 11 and visit <<http://esperanto.org/nask>>.



Contact addresses

Here are addresses for some of the larger local groups that meet regularly. Please send updates to <bulteno@esperanto-usa.org>.

California

Sacramento: <http://esperanto.org/us/esos>

San Diego: <http://groups.yahoo.com/group/EsperantoGrupodeSanDiego>

San Francisco:
<http://esperanto.org/us/SFERO>

Santa Barbara: dorothyjeanh@gmail.com

Colorado (Longmont) <http://ek-ek.org>

Connecticut (Wallingford) <http://esne.net>

District of Columbia <http://esperantodc.org>

Florida <http://niasfero.blogspot.com>

Georgia (Atlanta) <http://esperanto-atlanta.org>

Hawaii (Honolulu)
<http://esperanto.org/us/Honolulu>

Idaho (Boise) <http://terpomuloj.org>

Illinois

Champaign-Urbana: <http://ekoci.org>

Chicago: <http://esperanto-chicago.org>

Maine (Bangor, Houlton) <http://esne.net>

Massachusetts (Acton, Amherst, Cambridge, Northampton) <http://esne.net>

Missouri (St. Louis) <http://esperanto-stl.org>

New Jersey (Princeton)
<http://esperanto-nj.tripod.com>

New York

New York: <http://esperanto-nyc.org>

Rochester: <http://esperanto.lodestone.org>

North Carolina (Raleigh Durham)
charles.o.mays@gmail.com

Texas

Austin: <http://esperantaklubo.konfuzo.net>

Dallas: <http://esperanto-tx.org>

Virginia (Hampton Roads) <http://bonege.com>

Washington (Seattle)
<http://seattleesperanto.org>

Wisconsin (Madison)
<http://groups.google.com/group/esperanto-societo-madison>

Kia neŭtraleco?

“Nu, Esperanto estas sufiĉe bona ideo, sed la esperantistoj, ho... kiel enuigaj! Ili parolas pri nenio krom Esperanto mem!”

Similajn plendojn mi foje aŭdas; eble ankaŭ vi. Ne indas rebati ilin ĉi tie; abundas facile troveblaj kontraŭekzemploj kie oni uzas Esperanton por trakti diversajn temojn krom la lingvo mem.

Aliflanke, ni ja emas konversacii pri nia kara lingvo, ĉu ne? Komprenoble, ĉar Esperantujo enhavas tiel multajn aferojn diskutindajn. Krome, kun kiuj aliaj ni babilu pri furora libro aŭ albumo en Esperanto? Al kiuj ni faru harfendajn demandojn pri la akuzativo? Nur al aliaj esperantistoj, nature. Aparte dum renkontiĝoj, disa komunumo profitas la okazon por paroli pri temoj komunaj. Al observantoj kiuj ne konscias pri la riĉeco de Esperantujo (aŭ kiuj simple malestimas ĝin), povas ŝajni ke ni tro ofte nur “rigardas la proprajn umbilikojn”.

Ĝuste tial, mi strebas aperigi en *UE* artikolojn pri diversaj temoj “ekster” Esperantujo. Multaj artikoloj en la gazeto ja rilatas al Esperanto mem, ĉar unu ĉefa rolo de nia asocio estas prizorgi la kulturon. Tamen, almenaŭ laŭ mi, nia gazeto ne nur informu *pri* Esperanto; ĝi ankaŭ esploru temojn *per* la lingvo.

Estas tamen ia tubero en tiu afero. Same kiel multaj aliaj Esperanto-asocioj, Esperanto-USA restas nepre *neŭtrala*. Ni volas ke homoj de diversaj opinioj sentu sin bonvenaj en nia rondo, do ni strebas ne favori ajnan pozicion rilate al disputataj temoj kiel religio aŭ politiko.

Prave kaj saĝe: ni ja restu neŭtrala – kiel asocio. Foje ne estas sufiĉe klare,



Hoss FIROOZANIA

Hoss redaktas ĉi tiun gazeton ĉe sia hejmo en Roĉestro, NY. Liaj opinioj neniel reprezentas la vidpunktojn de la estraro; pri ili kulpas nur li mem!

hoss@lodestone.org

tamen, ĝuste kie devus situi la limo inter asocio kaj individuo. Ekzemple: ĉu niaj membroj ne uzu Esperanton por diskuti disputatajn temojn? Ĉu ili ne tuŝu tiajn temojn en nia gazeto?

Efektive, rilate al la gazeto, nia statuto ja limigas la amplekson de temoj akcepteblaj:

§1103. No material of political, religious, ideological, or tendentious nature shall appear in the organ unless the subject clearly pertains to the language problem.

Redaktante, do, mi ĉiam strebas resti fidele neŭtrala. Kiel severe mi interpretu la statuton, tamen? La sferoj de politiko, religio, kaj “ideologio” etendiĝas preskaŭ ĉien. Ĉu en *UE* vere aperu neniam materialoj kiuj tuŝas religion, politikon, aŭ la nebulan “ideologion”?

Aparte rimarkinda en la statuto estas la malofta angla vorto *tendentious*, adjektivo por “io aŭ iu kiu esprimas aŭ intence disvastigas vidpunkton – aparte vidpunkton disputatan”. Nu, gazeto kiu vere evitus ĉion tian restus sensuka, sengusta, kaj – kiel oni foje plendas pri esperantistoj – enuige unutona. Ĉu ne?

Kia estu justa redaktista politiko? Venontnumere mi priskribos provizoran aliron, kiun mi ĝis nun provas sekvi. Kion opinias vi pri tiu demando? Viaj pensoj estas, kiel ĉiam, bonvenaj. ★

Vjetnamaj diplomatoj vizitas vaŝingtonan E-grupon

VASHINGTONO, D.K. — Vjetnamaj diplomatoj Hai Nguyen kaj Pham Tung ĉeestis la Zamenhof-bankedon de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono (ESK) la 9-an de Decembro.

Hai Nguyen, ĉefo de la politika fako de la vjetnama ambasado en Usono, alparolis la bankedanaron, preparolante ne nur Esperanton en Vjetnamujo, sed ankaŭ la kreskadantaj rilatojn inter sia lando kaj Usono.

Hai mem naskiĝis en 1975 – en la sama jaro kiam la usona-vjetnama milito finfiniĝis – do, li diris, la milito kun Usono ne obsedas lin, nek la multegajn aliajn vjetnamojn de lia generacio. Ĉi tio estas lia unua posteno ekster Vjetnamujo, kaj li diris ke li estas sufiĉe kontenta akiri laboron ĉe la vaŝingtona ambasado – oni devas multe konkuri por kapti tiun postenon, li raportis.

Anstataŭ ambaŭflanka rankoro, li diris, niaj landoj pli konsideru kaj emfazu faktojn kiel:

- Usono nun estas la plej granda interŝanĝata partnero de Vjetnamujo – kaj, kontraste al Ĉinujo, Usono ne suferas interŝanĝan deficiton kun tiu lando.
- Usonaj kompanioj investas pli kaj pli da centmilionoj da dolaroj en Vjetnamujo.
- Usonaj mararmejaj ŝipoj nun bonvenigite vizitas la havenon de Golfeto Cam Ranh, antaŭa sovetia bazo.

Esperanto unuafoje venis al Vjetnamujo sufiĉe frue – en 1897, kun la francoj, Hai rakontis, sed iom post iom ĝi enradikiĝis en la landon ne kiel kolonia elemento, sed propravalore. HO CHI MINH mem eklernis Esperanton ekde 1914, li diris, dum vizito al Anglujo. Kiam Vjetnamujo deklaris sian sendependecon en 1945, Ho konvinkis la radioreton *Voĉo de Vjetnamio* komenci sendadi ankaŭ en Esperanto.

En 1957, Vjetnama Esperanto-Asocio vivantiĝis, kaj poste sekvis diversaj internaciaj kaj regionaj kunvenoj, lokaj grupoj, kaj, finfine, en 2012, la unua Universala Kongreso de Esperanto en Vjetnamujo. Ĝia temo estos *Esperanto: Ponto al Paco, Amikeco kaj Evoluado*.

Hai certigis nin ke la amikema vjetnama esperantistaro varme bonvenigos usonajn samideanojn. Persone, li malkaŝis, kiel diplomato, precipe imponas lin Esperanto. “Ĝia spirito estas tiom nobla”, li diris. “Ĝi servas kiel ponto inter nacioj.” (*Raportas Jim RYAN*)

Post zombioj, venas fantomoj


EMERYVILLE, KALIFORNIO — Post la sukceso de *Atako de la Lunaj Zombioj* kaj aliaj anglalingvaj filmoj, reĝisoro Christopher R. MIHM kreas novan filmon kun Esperanta sontrako: anglalingve ĝi nomiĝas *House of Ghosts*. Se vi deziras kontribui, eĉ je nivelo de unu dolaro, bonvolu iri al la retpaĝo <goo.gl/4q2ox>. La filmo aperos en la fino de Majo, kaj lumdiskoj haveblas de la retejo <<http://sainteuphoria.com>>. Prezentado de la filmo en Esperantaj kunvenoj estas invitita de la aŭtoro. (*Raportas George BAKER*)

Bishop Hill: iom da Svedujo en Usono

Al la fruaj kolonianoj, Bishop Hill rememorigis pri la lando de *Biskop Skulla* – la lando de kiu ili venis. Ĝi situas en centra Ilinojso, fondita fare de religia komunumo en 1850. La ĉefo Erik JANSON deziris krei utopian societeton, la “regnon de Dio” sur tero.

Nuntempe, Bishop Hill ne estas religia komunumo. Ĝi estas testamento de svedaj tradicioj kaj sveda vivo en Usono. Hodiaŭ, en Bishop Hill loĝas ĉirkaŭ cent personoj. Ĝi estas

trankvila



Kepper66/Vikimedia Komunumo (CC BY-SA)

La hotelon *Colony* oni konstruis en 1852 por koloniistoj.

Joelo BJORLING

Joelo estas lingvemulo kiu loĝas en Gilson, Ilinojso, vilaĝo kun ĉirkaŭ cent homoj. Li studis la francan, hispanan, grekan, hebrean, svedan, ĉinan, kaj eĉ Klingonon.

<bjorling@galesburg.net>

vilaĝo kun multaj butikoj kaj restoracioj. La butikoj vendas svedajn varojn kiel kandeligojn, Kristnask-figurojn, panon, bombonojn, kafon, kaj antikvaĵojn.

La restoracioj servas usonstilajn manĝaĵojn (viandon kaj terpomojn) sed ankaŭ knelojn, ruĝan brasikon, brunajn fabojn, kaj, je Kristnasko, *lutfisk*.
(daŭrigo je pĝ 8)

Esperanto-USA: kien, kiel kaj kial?

Ekas nova jaro. Ni festas pluan tur-niĝon ĉirkaŭsunan kaj la 152-an datrevenon de la naskiĝo de Ludoviko ZAMENHOF, iniciatinto de la Internacia Lingvo kaj unua motoro de ĝia tutmonda movado. Ni fermu tiun ĉi jaron per kuna pripensado pri la nuntempo kaj estonteco de Esperanto-USA, sub la titolo *Kien, Kiel kaj Kial*. Temo alloga, eĉ incita. Espereble mi iom povos klarigi mian personan imagon por la antaŭenigo de nia landa asocio kaj de la Esperanto-movado en nia lando ĝenerale.

En mia frua juneco, de tempo al tempo mi estis kaptita de tiuj ordinaraj junulaj krizoj, kiam vi spertas ke neniu komprenas vin, neniu aŭskultas vin, neniu taksas vin grava. Terura sento,



Orlando E. RAOLA

Orlando estas prezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio. Vi povas kontakti lin per la adreso:

oraola@gmail.com

tamen komuna kaj tute natura parto de la penplena procezo fariĝi plenkreskulo. Sed tiam mi malkovris, ke mi povas fermi la okulojn kaj imagi ke mi ĉirkaŭflugas la planedon de tre malproksime. De la fenestro, la tero videblas je la grandeco de tenisa pilko kaj surprizite mi povas vidi samtempe ambaŭ polusojn, vintron kaj someron samtempe. La problemoj, kiuj antaŭ sekundo sufokis min, la konfliktoj nesolveblaj kaj la

Bishop Hill estas terkultura komunumo. Bienistoj produktas maizon, sorgon, sojfabojn, bovinojn kaj porkojn. Ili helpas siajn najbarojn planti kaj rikolti. Agrikulturo estas ĉefa parto de la historio de Bishop Hill. En Septembro okazas festado de “agrikulturaj tagoj”, aŭ en la sveda, *jordbruksdagarna*. Oni montras malnovajn traktorojn kaj plugilojn, kaj ilojn tiritajn de ĉevaloj. Oni faras panon, fromaĝon, kaj sapon.

Ĉirkaŭ 1946, Bishop Hill estis simila al “fantoma vilaĝo”. Tie estis kelkaj komercaj servoj, inkluzive de aŭtoservejo, apartara butikoj, kaj nutrovaroj. Tamen



ne estis ĝis la 1960-aj jaroj ke Bishop Hill denove fariĝis aktiva. Hodiaŭ, Bishop Hill salutas multajn turistojn. Ili venas de relative proksimaj lokoj kiel Ĉikago, sed ankaŭ de malproksimaj lokoj kiel Finnlando, Kanado, Ĉinujo, kaj Svedujo.

Populara evento en Bishop Hill estas “Kristnaska Merkato”, aŭ *Julmarknad*. Ĝi okazas la semajnfino post Dankotago kaj la unuan semajnfino de Decembro. La restoracio servas specialajn manĝojn kaj la butikoj estas plenaj je klientoj. Estas tiom da homoj ke oni povas apenaŭ marŝi!

Vizito al Bishop Hill estas historia, kultura aventuro. Venu kaj vidu! ★

amarigaj kvereloj restas tie, for, malgrandiĝintaj ĝis nevidebleco... Ah, kiel liberiga sinteno! Reveninte al la realo, ĉio aspektis pli pure, pli facile solveble, pli apiksimiĝebla.

Mi anekdotas por reliefigi la gravecon uzi nian imagkapablon por solvi la problemojn kiuj nin superŝutas, por doni al ni la ŝancon analizi kaj trovi novajn elirejojn kaj alirejojn. Ja oni atribuas al Einstein la instruon, ke ne eblas solvi problemon elde la sama idea framo kie la problemo estiĝis...

Kien

Por kompreni kien ni direktu la evoluon kaj laboron de Esperanto-USA, indas atenti bone la historion. Kiel homa kaj socia agado, Esperanto adaptiĝis ĉiam al la novaj realoj de mondo ĉiam ŝanĝiĝanta. Tiu adaptiĝo fariĝis ĉiam pli kaj pli rapida ĉar nia mondo verŝajne turniĝas ĉiam pli rapide. Se vi bezonas pruvon pri tio, bonvolu dum sekundo mense retroiri al la unuaj jaroj de via esperanta agado, al via unua landa kongreso, al via unua internacia sperto, al via unua zamenhafa bankedo... Vi konstatos (espereble ne kun granda surprizo) kiom multe ŝanĝiĝis la materia mondo ĉirkaŭ vi: ne troveblas poŝtelefonoj, nek Interreto, la monda mapo estis disdividita en alitipaj blokoj kaj aliancoj, la landlimoj estis tute malsimilaj kompare kun la hodiaŭaj. Esperanto sukcese adaptiĝis kaj daŭre adaptiĝos ĉar finfine ĝi celas satigon de fundamenta homa bezono, kiu daŭre restas firme neŝanĝiĝebla: la bezono komunikigi, amike interrilati, profunde interkompreniĝi.

Ĉiuj lingvoj nuntempe uzataj en la mondo alcelas tiun bezonon, sed Esperanto havas specialan lokon inter ili, ĉar:

- ĝiaj uzantoj memvole fariĝas kaj restas anoj de la lingva komunumo
- ĝi rezultis el konscia planado
- ĝi ne estas ligita al iu specifa etno aŭ gento aŭ kulturo/historio

En la mondo de 2012, troviĝas amaso da homoj kiuj sentas kaj esprimas, ke la monda interhoma komunik-problemo jam estas solvita per uzado de la uson-angla lingvo. Ĉar nia asocio reprezentas la Esperanto-movadon ene de Usono, ni estas fakte vivanta pruvo pri la dubindeco de tiu aserto. Jes, kelkaj komunikbezonoj, precipe sur la kampoj de scienco, komerco, politiko kaj simile estas pli-malpli solvataj internacie pere de la uson-angla lingvo, sed la kvalito de komunikado kiun ni proponas (kaj de tempo al tempo sukcesas realigi) estas kaj restos neatingebla pere de la uson-angla aŭ de iu ajn alia etna lingvo, kaj do estas nia longdaŭra tasko diskonigi tiun veron al ĉiuj direktoj kaj helpi al ĉiuj kompreni tiun realon.

Ni ankaŭ devas serioze okupiĝi pri konservado kaj pligrandiĝo de nia instrua/eduka/kleriga sistemo, tiel ke nia komunikilo daŭre estu bela, esprimopova, efike funkcia kaj artisme harmonia. La disfloro de novaj teknikaj rimedoj permesas novajn manierojn por lerni kaj lernigi "la bonan lingvon", kaj plej grave, konservi kion ni atingis en nia longdaŭra historia evoluo ĉi-rilate.

Kiel

Ni laboru sur la menciitaj kampoj kiel landa asocio, sed ankaŭ en la kadro de la tutmonda Esperanto-movado, sub la tegmento de UEA, kies aliĝinta landa asocio ni estas. UEA ankaŭ ŝanĝiĝas kaj

adaptiĝas al la mondaj evoluoj, eĉ se oni legas de tempo al tempo opiniojn kiuj taksas tiun adaptiĝon tro malrapida. Jes, eble, kaj tamen, anstataŭ amare plendi pri tio aŭ alio kion UEA faras aŭ ne faras, ĉu ne estus pli konvene uzi tiun energion por elpensi kiel vi, kaj vi, kaj vi kaj mi povas trovi novajn manierojn, novajn ilojn kaj rimedojn por ke UEA kaj Esperanto daŭre kreskiĝu, fortikiĝu kaj plenumu siajn deklaritajn celojn?

Jen alia grava laborlinio por nia landa asocio. Kompreneble, unu el la plej gravaj agadoj de UEA estas la organizado kaj okazigo ĉiujare de la Universala Kongreso de Esperanto. Lastafoje tiu belega vojaĝanta Esperanto-festivalo okazis en Usono antaŭ kvardek jaroj. Ĉu ne tro longa tempo? Kelkaj el ni opinias, ke ni devas eklabori tuj por sukcese inviti denove la Universalan Kongreson al Usono, plej eble en la jaro 2015, plejeble al Sanfrancisko, okaze de la centjariĝo de UK en tiu ĉi regiono, fakte la plej malgranda UK iam ajn okazinta. Sed la mondo ŝanĝiĝis, ĉu ne? Ĉu ni kapablos organizi grandan UK-on ĉi tie, kun partopreno de esperantistoj el ĉiuj mondopartoj? Ni volas trovi la respondojn al tiuj ĉi demandoj, kaj al tiu direkto eklaboros la Esplorkomisiono pri UK en Usono, kiun mi lanĉis en Decembro 2011.

Estimataj geamikoj: Fine mi devas respondi la plej facilan demandon:

Kial?

Mi longe cerbumis, kial..., kaj fine mi decidis, ke estas nur unu respondo: pro amo. Ni amas, kaj Esperanto ĉiam estas laboro de amo. Ni ne pliriĉiĝas per ĝi (fakte la malo validas), mi forte dubas eĉ

ke ni fariĝas pli saĝaj... Sed kion mi ne plu dubas, estas ne nur la forto de amo, de amo al niaj samspecanoj, amo al nia planeda kunaventuro, kio donas al ni fortojn por pluteni la torĉon...

Mi volas adiaŭi per poemo de William AULD, nun proponita en kelkaj Esperanto-rondoj kiel la nova himno de Esperanto:

La Plenumo

En ĉiu lando, ĉiu stato,
dediĉite kaj defie,
Trovegas la konantoj
de l' komunikilo homa;
Ni avangardas mondon,
kie la homaro ĉie,
Parolos senkatene
en komuno idioma.

La majstra revo estis prava,
disvolviĝis la realo;
Ne vana estis fid' de l'
pioniroj kaj martiroj,
Ĉar ni hodiaŭ amikiĝas
unulingve en egalo,
Kaj spertas jubilate
plenumiĝon de l' aspiroj.

Nacioj de la mond', atentu!
Paca kunlaboro eblas,
Sen ombroj de suspekto,
nekompren' kaj vortobstaklo
En mateniĝo de la mondo,
nia arda flam' ne feblas,
Sed lumas jam konstante kiel
signo de l' miraklo!



Venu al NASK 2012!



Portu viajn ĉapelon,
naĝkostumon, kontraŭ-
sunan kremon, kaj eĉ vakeraĵajn botojn!
Ĉi-jare la kursaron bonvenigas la Uni-
versitato de Teksaso en Dalaso, ĵus
post la fino de la Landa Kongreso.

Alvenu la 25-an de Junio, kaj foriru la 4-an de Julio – jen ok plenŝtopitaj tagoj de lernado kaj amuzo. NASK denove prezentos mallongan kursaron, ĉi-foje en sunplena Dalaso. La universitato estas rapide kreskanta kun multaj novaj konstruaĵoj, meze de la granda urbregiono Dallas/Fort Worth.

NASKanoj loĝos kune sur kvara etaĝo de nova dormejo kie ili dividos tri-homajn ĉambrarojn; ĉiu partoprenanto havos privatan dormoĉambron.

La dormejo estas klimatizita, kaj la klasĉambroj situas en la sama konstruaĵo. En la dormejo estas granda lavejo kun sen-kostaj lavmaŝinoj kaj sekigiloj. Oni

havas senpagan aliron al Interreto.

La manĝejo estas je plaĉe sepminuta paŝado for de la dormejo, kaj tie troviĝas multaj diversaj pladoj kiujn oni elektas laŭvole.

La internacia instruista teamo de Spomenka ŠTIMEC (Kroatujo), Tim WESTOVER (Usono), kaj Birke DOCKHORN (Germanujo) provizos tri nivelojn de lernado. Hoss FIROOZNI laboros kiel help-instruisto kaj gvidos la eksterkursajn programojn.

Ĉi-jare studentoj povos veni iom pli frue por la Landa Kongreso de Esperanto-USA, samloke kaj en la sama loĝejo (22–25 de Junio). Oni faru apartajn aranĝojn ĉe: <http://esperanto-usa.org>.

La tuta kosto por NASK 2012 (kursoj, loĝado, manĝado) estos: **USD \$625.00 ĝis la 22-a de Marto; USD \$675.00 poste.**

Stipendia helpo haveblas por plentempaj studentoj kaj instruistoj, kaj loĝantoj en latinamerikaj landoj. Kontakti administranton Ellen M. EDDY, <eddyellen@aol.com>.

Pli da informo pri NASK troviĝas rete, ĉe: <http://esperanto.org/nask>.



Nova vojo por Esperanto

Jen teksto de la festparolado kiun prezentis d-ro TONKIN okaze de la 59-a Landa Kongreso de Esperanto-USA, en Emeryville, Kalifornio.

En la libro *What I Saw* (“Kion mi vidis”), kolekto de artikoloj pri Berlino en la intermilita periodo de la juda ĵurnalisto Joseph ROTH, Roth rakontas pri homo, kiu en la 1920-aj jaroj estis liberigita el karcero post kvardek jaroj de mallibero. Li revenis al mondo tute alia ol tiu, kiun li forlasis: aŭtomobiloj, telefonoj, motoraj aŭtobusoj, aviadiloj, filmoj, radio, elektra lumo – stratoj tute aliaj ol tiuj, kiujn li memoris el pli frua epoko; informoj, kiuj flugas de loko al loko; la homaj rilatoj profunde ŝanĝitaj. Li apenaŭ povis rekoni sian ĉirkaŭaĵon.

En neniu alia tempodaŭro de simila longeco okazis nek okazas tiaj ŝanĝoj en la ĉirkaŭaĵo kiaj okazis inter la jaroj 1880 kaj 1920. Ilin akompanis profundaj ŝanĝoj en la homaj kredoj: unue granda optimismo kiam novaj eltrovaĵoj malfermis novajn vojojn al la homoj: Esperanto estis unu produkto de tiu periodo de optimismo; due, post la skuo de la Unua Mondmilito, tamen espero, ke eblos krei pli bonan mondon: Lanti kaj lia socia vizio estis produktoj de tiu periodo; Privat kaj lia kredo je internaciaj organizaĵoj kiel garantiiloj de la paco estis ankaŭ tia produkto.

Hodiaŭ, la komunika revolucio havas pli subtilajn eĉ se simile profundajn ŝanĝojn. Ili ne tiel efikas la aspekton de la stratoj: la aŭtomobiloj kaj aŭtobusoj eble ŝanĝis sian stilon en kvardek jaroj, sed ili restas aŭtomobiloj kaj aŭtobusoj. Anko-



Humphrey TONKIN

D-ro Tonkin estas profesoro de la angla lingvo kaj membro de la Akademio de Esperanto. Interalie li servis kiel prezidanto de UEA kaj nun estras la fondajon *Esperantic Studies Foundation* (ESF).

tonkin@hartford.edu

raŭ oni uzas elektrajn lumojn. La ŝanĝoj okazis kaj okazas en la maniero laŭ kiu la individuo frontas la mondon:

- Interreto ebligas formiĝon de komunumoj malgraŭ fizikaj distancoj, tiel ke homoj povas samtempe alproprigi plurajn identecojn.
- Homoj tekstas inter si; ili pepas; ili per *Facebook* formas amikajn rondojn. *iPhone*, *Droid* kaj similaj eltrovaĵoj ebligas poŝan kunporton de komunikaj eblecoj kun la tuta reta mondo.
- Se retmesaĝoj imitas letterskribadon, do esence estas formo de tuja leterado, tekstado kaj pepado rompas definitive la formon kaj ĝenron de leteroj.
- Tekstado fakte estas formo de perskriba parolado, do ia hibrido inter parola kaj skriba lingvaĵo.
- *iTunes* esence detruis la koncepton de arigo de muzikpecoj en albumojn.
- Nun la alveno de e-libroj komencas malkonstrui niajn nociojn pri libroj. Libroj havas difinitan longecon kaj difinitajn formojn ĉar ili devas esti presataj kaj vendataj; sed tiaj limigoj ne validas ĉe elektronikaj tekstoj.

Estas malfacile prognozi kiel la homoj pensos kaj agos kaj organizos siajn pensojn en tiu ĉi nova mondo. La malnovaj certecoj malaperas; aperas multe pli granda fluideco de formoj.

Post la Dua Mondmilito, dum mallonga momento ekestis denove espero pri paca mondo. Eleanor ROOSEVELT uzis tiun momenton por ebligi verkadon de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj; Lapenna uzis ĝin por kampanji por Esperanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Dum la jaroj de malkoloniigo en la 1950-aj kaj 1960-aj jaroj oni supozis, ke per lingvoplanado eblos enkonduki efikan lingvan komunikadon en novaj ŝtatoj. La esperantistoj imagis, ke eble la diversaj ŝtatoj racie decidus instrui Esperanton en siaj lernejoj.

Hodiaŭ, eĉ tiuj landoj, kies konstitucioj garantias homajn rajtojn, emas argumenti, ke tiuj samaj rajtoj ne aplikiĝas al necivitanoj, do, ke ili ne estas universalaj sed nur kondiĉaj. Fakuloj trovis, ke ŝanĝi la lingvan konduton de la homoj estas multe pli komplika ol antaŭe ĝi ŝajnis. Kaj eĉ esperantistoj ne kredas, ke racio regos inter la nacioj kaj kondukos ilin aŭtomate al Esperanto. Ĉio fariĝas pli necerta, pli konfuza.

Kiel ni rilatu al tiuj grandegaj ŝanĝoj? Kiel la esperantistoj funkcii en tiu fluida mondo?

Kelkaj aspektoj eĉ helpas nin. Se la relative unuanimeco pri la graveco de homaj rajtoj malaperis, inter tiuj kiuj tamen konsideras ilin gravaj regas pli granda malfermiteco al redifinoj. Oni pli bone komprenas, ke lingvaj rajtoj gravas, kaj ke misuzo de lingvoj kiel instrumentoj de potenco estas neakceptebla.

Kaj la fluideco de pensado kondukis al tio, ke oni komencas kompreni, ke lingvoj ne konsistas nur el firmaj normoj, sed ke ili estas grandaj faskoj de variantoj, kaj eĉ ke unu lingvo miksiĝas kun siaj najbaroj en plej diversaj manieroj; oni komencas kompreni, ke eĉ Esperanto estas “vera” lingva fenomeno, kiun oni traktu same serioze kiel oni traktas aliajn lingvajn fenomenojn.

Se la nova fluideco de pensado igas ankaŭ Esperanton akceptebla, la elektronika revolucio en si mem eksmodigis kaj senefikigis la malnovajn organizajn strukturojn, kiujn la esperantistoj kreis en la fruaj jaroj de la lingvo kaj utiligas ĝis hodiaŭ. Iam ni bezonis Esperanto-organizaĵojn por ligi la esperantistojn per gazetoj kaj per retoj de lokaj kluboj kie oni povis aŭdi kaj paroli la lingvon. Esperanto-organizaĵoj eldonis librojn kaj organizis kongresojn. Vizaĝalvizaĝa komunikado ankoraŭ gravas, sed nun oni povas sidi hejme kaj aŭskulti la lingvon, aŭ per Skajpo konversacii trans longaj distancoj, aŭ spekti filmitajn Esperanto-konversaciojn. Tekstojn, eĉ tutajn librojn kaj tutajn vortarojn, oni povas trovi ĉe la reto. Kluban vivon oni povas sperti virtuale. Ankoraŭ ekzistas rolo por Esperanto-institucioj, sed ĝi profunde ŝanĝiĝis.

Ĉi tie en Emeryville la estraro de ESF pridiskutas tiujn alternativajn formojn de organiziĝo kaj jam faras grandajn paŝojn por rekoncepti la organizajn formojn de la Esperanto-movado. Jam de jaroj, fakte, ESF faras tion. Lernu.net, la retpaĝaro por lerni Esperanton, estas unu ekzemplo de tiuj novaj organizaj formoj. ESF komencis subvencii ĝin antaŭ proksimume kvin jaroj. Hodiaŭ ĝi fariĝis ne

nur loko kie oni povas lerni Esperanton sed tuta komunumo de Esperanto-uzantoj. Lastatempe Lernu festis akiron de sia centmila registrita uzanto. Tiu estas senprecedenca atingo. Komprenu pri kio temas: oni povas viziti kaj uzi la paĝaron sen registriĝi – sed centmil homoj faris plian paŝon: ili anoncis sian pretecon fariĝi anoj de tiu komunumo. Pli ol dekdu mil el tiuj centmil homoj loĝas ĉi tie en Usono – la lando kun la plej granda nombro de registritaj uzantoj. En tiu senco, Lernu estas la plej granda Esperanto-organizaĵo en la mondo, kaj la plej granda en Usono. Necesas konstrui sur tiu larĝa fundamento.

Nun ESF esploras kiel ligi al Lernu diversajn Esperanto-spertojn – fizikajn renkontiĝojn de uzantoj, ekzemple ligojn inter Lernu kaj NASK – tiel ke NASK fariĝu ne nur fizika kursaro, sed kombino de ĉeestaj kaj distancaj spertoj. Surbaze de la strukturo Lernu, eblus krei diversajn servojn por esperantistoj. Per reklamado, vendoj kaj varbo de donacoj, eblus krei fluon de enspezoj por financi pliajn larĝiĝojn de la strukturoj kaj varbadon de eĉ pli da uzantoj.

Estas malfacile fari tiujn novajn kaj esencajn paŝojn per tradiciaj Esperanto-organizaĵoj regataj de siaj membroj, ĉar ne povas okazi ŝanĝoj sen la konsento de majoritato de membroj kaj tiaj organizaĵoj kutime ne estas pretaj forlasi siajn kutimojn kaj tradiciojn. Pro tio oni bezonas novigajn strukturojn, ekster la normalaj asocioj, kiuj povas eksperimenti per novaj organizaj formoj. Tia organizaĵo estas ESF.

En Emeryville ankaŭ okazos kunveno pri la laboro de esperantistoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Ni kreis novan organizaĵon, *Esperanto por UN*, kiu celas eduki espe-



rantistojn pri la laboro de UN kaj informi UN pri la pretendoj de Esperanto. Ni ne celas, ke UN mem simple akceptu Esperanton, sed unue, ke ĝi rekonu la rolon de lingvoj en la homaj interrilatoj kaj la principon de lingva justeco kaj lingva demokratio. Ni argumentas, ke en tiu senco Esperanto estas alternativo al lingva hegemonio – al la superrego de unu nacia lingvo super aliaj lingvoj.

Mi volas fini fakte per ĝuste tiu ideo, kiu konsistigas novan vojon por Esperanto. La procedoj de tutmondiĝo donas ĉiam pli fortan rolon al la angla lingvo. Neparolantoj de la angla devas investi siajn rimedojn por kompetentiĝi pri la angla. Anglalingvanoj ĝuas grandajn avantaĝojn en la komerco, la scienco, kaj la politiko. Sed tion farante ili perdas sian perspektivon pri la mondo – mondo bela kaj bunta, mondo multlingva kaj varia, mondo multkultura. Nur Esperanto, kiu traktas ĉiun homon egale kaj donas al ĉiu homo voĉon, prezentas elteneblan alternativon al tiu lingva superrego. Ni ne venkos kontraŭ la potenco de la angla lingvo, eĉ se ni volus tion fari.

Sed ni ja povas proponi Esperanton kiel lingvon de monda civitaneco, lerneblan paralele kun aliaj lingvoj kaj uzeblan kiel simbolo de toleremo kaj respekto.

Oni ofte atentigas, ke kiam okazas grandaj teknologiaj ŝanĝoj, postlamentas spiritalaj ŝanĝoj en la homoj. Zamenhof, dum aliaj inventis la petrolan motoron aŭ lernis flugi, proponis spiritalan ŝanĝon, kiu akompanu la teknologiajn ŝanĝojn. Sen moderna transportado, ne okazus la kongreso en Bulonjo-sur-maro kaj ne ekestus internacia Esperanto-movado. Hodiaŭ, por akompani la ŝanĝojn en la komunika teknologio, kaj la rezultajn

ŝanĝojn en la konservado kaj disvastigo de scioj, ni denove proponas spiritalajn ŝanĝojn en la homaro per Esperanto, la alternativa lingvo. Ĝia voko flugos de loko al loko per flugiloj de la reto, per Skajpo, per pepado, per tekstado – teknikaj ŝanĝoj, kiuj jam donas novan impulson al Esperanto. Mi esperas, ke vi subtenos tiujn novajn, revoluciajn alirojn al nia jam hardita lingvo. Esperanto formu investon en nia estonteco, klopodon krei pli justan mondon. Se iam ajn nia suferanta mondo bezonus tian novan perspektivon, tiu tempo estas la hodiaŭa tempo. ★

*Vilĝo HARRIS prezentas al ni alian enigmon el la libro Gimnastiko por Cerbo de TACUMI Hirosi, havebla ĉe la libroservo. **Ne sendu vian solvon al la redakcio!** La krucvortenigma konkurso revenos venontnumere, kune kun la solvoj de ĉi tiu enigma kaj la lastnumera krucvortenigma.*

LONGA KARGOTRAJNO



Kuris tre longa kargotrajno. Ĝi ektransiris sur ferponton, kies longeco estas 380 metroj. Por komplete transpasi necesis ekzakte 1 minuto. Baldaŭ ĝi eniris en tunelon, kies longeco estas 1430 metroj, je la sama rapideco.

Tiufoje necesis 2 minutoj kaj 10 sekundoj de ĝia ekeniro ĝis plena eliro.

Kiom estas la longeco, kaj kiom estis la rapideco de tiu trajno?

Por interesigi niajn legantojn pri varoj en la retbutiko, la Direktoro de la Centra Oficejo foje elĉerpos mallongan parton de libro por prezenti ĉi tie. Lia unua elekto venas el la rakonto "La Barelo de Amontilado" el la libro Rakontoj de E. A. POE, esperantigita de Edwin GROBE.



Jam preskaŭ estiĝis la krepusko kiam, unu vesperon dum la intensega frenezo de la karnavala sezono, mi renkontis mian amikon. Li salutis min kun troigita varmo, jam trinkinte multe. La viro vestiĝis tre heterogene. Surkorpe li portis plurstrian strik-tajon dum surkape sidis konusĉapo kun sonoriletoj. Tiom ĝojigis min lin renkonti ke mi opiniis neniam povi finpremi lian manon.

Mi diris al li: "Mia kara Fortunato, kia bonŝanca renkontiĝo! Kiel bonsanan aspekton vi elmontras hodiaŭ! Nu, mi akiris sesdekgaljonan barelon da io identigita kiel Amontilado-vino. Tamen mi malcertas pri ĝi."

"Kion?" li diris. "Ĉu Amontilado-vinon? Ĉu sesdekgaljonan barelon? Ne eblas! Kaj mezkarnavale!"

"Mi malcertas pri la afero," mi respondis. "Mi vere stultiĝis pagante la suman Amontilado-prezon sen peti vian opin-

ion. Mi ne sukcesis vin malkovri kaj timis perdi la okazon bonaĉeti."

"Amontilado-vino!"

"Mi spertas dubojn."

"Amontilado-vino!"

"Kaj tiujn mi devas kontentigi."

"Amontilado-vino!"

"Pro tio ke vi okupiĝas, mi jam survojas renkonti Lukezon. Se iu havas distingo-kapablon, estas li. Li diros al mi..."


"Lukezo ne scipovas distingi Amontilado-vinon disde ŝereon."

"Tamen kelkaj malsaĝuloj asertas kia lia gustumo egalas vian."

"Venu, ni foriru."

"Kien?"

"Al viaj keloj."



RAKONTOJ DE E. A. POE, tradukis Edwin GROBE

La Murdoj de Kadavrejo-Strato, La Mistero de Marnjo Roĝeto, La Barelo de Amontilado, La Denuncema Koro, Manuskripto Trovita en Botelo, kaj La Falo de Uŝer-Domo. Mole bindita. 134 p. 2010. Usono. \$9.30

Order from **Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530**, or online at <<http://esperanto-usa.org/retbutiko>>.

Complete descriptions can be found online. If a title is out of stock, the online bookstore can notify you by email when it becomes available again. Due to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.